

August Heinrich Hoffmann,

Surprizo

tradukita de Manfred Retzlaff

Kaj mi migras multajn tagoj
Tien-reen tra l' montar',
Tra la urboj, tra l' pejzaĝo
Ĝis la bordo de la mar'.

Belajn trajtojn kaj rideton
Nur malofte vidas mi,
Nur rigardojn malĝojegajn
Pro mizero ĉie ĉi.

Ĝojo kaj beleco vivas
En marmor', sur bildoj nur,
Sude jen en Itali', en
La mirakloj de l' natur'.

*Traduko de la Germana poemo "Überraschung" de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (Hoffmann von Fallersleben, *1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1998-12-06.*

MR-316-1a / Arg-788-1579 (2013-01-21 23:14:53)